



PILO-PRESS

Internacia
Informservo

SUBTENU la

Esperanto
Kulturon!

=====

N-ro 20/1975 29 majo 1975
Aperas ĉiusemajne

Eldonanto/Herausgeber:

Ludwig Pickel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg 1
Tel. (09 11) 46 36 49; 51 42 69

Favora recenzo pri Proksima Nekonato

Prezentado de la Pola Esperanto-Teatro en FRG

Nürnberg (pp) Pri la prezentado de la Esperanto-teatraĵo "Proksima Nekonato" en Nürnberg, la 25an de majo 1975, aperis favora recenzo en la gazetaro de Nürnberg. Alfred Raab, la recenzisto, skribas: "Salutinda kultura kontribuo sur internacia nivelo do, servante ankaŭ al la popola interkompreniĝo. Ĝi venas el Pollando, la naskiĝlando de la planlingvo Esperanto. Estis vivanta pruvo, ke kaj kiel Esperanto servas al la interkompreniĝo, ne nur sur la bazo de utileco, de la ĉiutagaj aferoj, sed ankaŭ sur la pli pretendema nivelo de literaturo kaj teatro."

Weltsprache auf der Bühne

Aufführung des polnischen Esperanto-Theaters Warschau in der Meistersingerhalle — Die beiden Darsteller sind derzeit auf Tournee durch Mitteleuropa

Esperantistoj aus Nürnberg und Fürth hatten sich in der Meistersingerhalle zusammengefunden, um einer Aufführung des Polnischen Esperanto-Theaters, Warschau, beizuwohnen. Gespielt wurde die Komödie „Naher Unbekannter“ (Proksima Nekonato) des polnischen Autors Aleksander Sciborylski, in der Übersetzung von Jerzy Grun.

Eine leichte Komödie, reich an Überraschungen. Eine schöne Frau sucht den Helden des Stücks in seiner Wohnung auf. Sie wird die Nacht mit ihm verbringen — in langen Gesprächen. Anscheinend soll sie verhindern, daß er einschläft... Ist sie Samariterin und Pflegerin oder am Ende seine eigene Frau? Schnell wechselt sie die Rollen, spielt seine Mutter, Tante, Kusine. Es gibt Theater im Theater, Erinnerungen werden verarbeitet, man weiß nicht, sind es echte oder erdachte. Der Zuschauer ist verwirrt, amüsiert, fasziniert.

Dann begrüßt er dies ist eine Einladung zur Identifikation, ein witziges Glücks-Spiel, eine Herausforderung zum Schmunzeln und Nachdenken. Er durchschaut die Verschiebung der Grenzen zwischen Wirklichkeit und Fantasie. Ständig knistert es im dramaturgischen Gebälk, die Lösung des Rätsels offenbart sich in letzter Minute, wie in einem Krimi.

Die beiden Darsteller, Kalina Pienkiewicz und Zbigniew Dobrowieski, haben sich in Warschau einen Namen gemacht: sie hauptsächlich als Bühnenschauspieler, er in etwa 30 Filmen. Beide sprechen fließ-



Einen seelischen Zusammenbruch hat Antonio, der Bühnenschriftsteller, erlitten. Krankenschwester Magdalena kümmert sich um ihn. Kommt sie wirklich als Pflegerin — oder ist sie seine Frau, die ihn verlassen hat und nun zurückkehrt? Foto: Ulrich

Send Esperanto, nicht nur im Stück. In der Pause berichten sie Interessantes von ihrer Tournee.

Rund 500 Aufführungen dieser Inszenierung hat es schon gegeben, davon 400 in polnischer Sprache, etwa 100 auf Esperanto. Sie fanden in Polen und in der Tschechoslowakei statt und in 37 Staaten der USA. Bei uns wurde bereits in Bamberg und Würzburg gespielt, außerdem in Hamburg (voriges Jahr beim Esperanto-Weltkongress). Anschließend an Nürnberg geht es nach München und demnächst

nach Belgien, Dänemark und in die Niederlande.

Ein begrüßenswerter kultureller Beitrag auf internationaler Ebene also, auch der Verständigung dienend. Er kommt aus Polen, dem Geburtsland der Plansprache Esperanto.

Ein lebendiger Beweis wurde geliefert, daß und wie Esperanto der Verständigung dient, nicht nur auf der Basis der Zweckmäßigkeit, des Alltags, sondern auch auf der anspruchsvolleren Ebene der Literatur und des Theaters.

ALFRED RAAB

Pliaj prezentadoj:

Stuttgart-

Bad Cannstadt

Gaststätte

Flurwirt

Flurstr. 9

7.6.75 17 horo

Bonn

Studentenheim

"Newman-Haus"

Adenauerallee 63

9.6.75 20 h

En ambaŭ

prezentadoj

okazos libro-

ekspozicio de

Libroservo

Pickel

Nürnberg

Ĉiuj esperant-

tistoj de la

koncernaj urboj

kaj ĉirkaŭaĵo

estas invititaj!

Ludwig Pickel

85 Nürnberg 1

Pöck Nürnberg

01956 851

"Ludwik Zamenhof" ne sole sur maroj kaj oceanoj -
"Ludwik Zamenhof" ankaŭ en la aerspacoj

=====

Grava rekono de Esperanto fare de LOT

Varsovio (pp/JG) En la mezo de majo aperis pollingva informilo "ABC LOTU" (ABC de LOT). Ĝi estas kompendio de la historio, aktuala stato kaj evoluaj perspektivoj de la pola flug-kompanio "LOT". Kiel konate, la Polaj Aer-Linioj "LOT" jam antaŭe montris sian tre favoran rilaton al la internacia lingvo, aperiginte en Esperanto broŝurojn ("Kiel Nikolao Kopernik aviadisto fariĝis", "Kun LOT de Ateno ĝis Zuriĥo", "Rakontoj de kapitanoj"), esperantan-anglan vortareton por pasaĝeroj de LOT, leterpaperon kaj agendojn kun esperantlingvaj surskriboj, same poŝkartojn kun Esperanto-teksto.

La supre menciitaj manifestiĝoj de la rekono por Esperanto flanke de "LOT" palas tamen kompare kun la ĵusa decido de la direkcio de la pola flugkompanio, sendube senprecedenca en la utiligado de la internacia lingvo fare de la flugentreprenoj tra la mondo.

Fluraj mondaj flugkompanioj havas la kutimon doni diversajn nomojn al siaj unuopaj aviadiloj. La saman kutimon havas ankaŭ LOT. En ĉapitro dediĉita al la aviadilaro de LOT troviĝas listo de la aviadiloj de LOT trafikantaj laŭ internaciaj kunligoj. Unue sekvas kvin plej grandaj aviadiloj de la tipo "IL-62", nome: "Mikolaj Kopernik", "Tadeusz Kosciuszko", "Fryderyk Chopin", "Kazimierz Pulaski", "Henryk Sienkiewicz".

La sekva tipo estas la jeto "TU-134". En tiu ĉi klaso troviĝas ok aviadiloj: "Ignacy Paderewski", "Wladyslaw Reymont", "Maria Sklodowska-Curie", "Ludwik Zamenhof", "Ignacy Domeyko", "Pawel Strzelecki", "Josef Bem" kaj "Janusz Kusocinski".

La loko de "Ludwik Zamenhof" inter la dufoja Nobel-premitino, Maria Sklodowska-Curie, kaj la elstara, mondfama pola mineralogo kaj geologo indikas la rilaton de la direkcio de LOT al la internacia lingvo.

Tom da detaloj pri "nia" aviadilo:

"Ludwik Zamenhof" - Registraj Signoj: SP-LGD; Registra numero: 1460; Dato de la registro: 26.5.69; Enverguro de la aloj: 29 metroj; Longeco: 35 metroj; Alteco: 9 metroj; Maksimuma pezo por la starto: 45 tunoj; La komerca pezo: 7,7 tunoj; La flugrapideco: 850 km/pohore; Nombro da pasaĝeraj lokoj: 72.

Ĝis nun en la aerspacoj la Esperanto-akcento esprimiĝis en tio, ke la patro de la soveta kosmonaŭto Titov estas esperantisto. Nun la Majstro mem - dank' al la Polaj Aer-Linioj "LOT" - trasagas la aeron kaj alteriĝas en la mondaj aerhavenoj, anoncante la ekzistadon de la internacia lingvo kaj la viklecon de la internacia esperantista movado. Baldaŭ en "Heroldo de Esperanto" aperos la foto de la aviadilo "Ludwik Zamenhof".

Gratulu al: Polaj Aer-Linioj "LOT", Warszawa, ul. Grojecka 17, Pollando.

Jerzy Grum en Belgio

Bruselo (pp). Laŭ invito de "Heroldo de Esperanto" Jerzy Grum, redaktoro de Pola Radio, Esperanto-Redakcio, nuntempe restadas en Belgio, kie li faras kelkajn prelesojn.

Pilo-Press, internacia informservo ĉiusemajna

Jara abonkoto 30 GM. Eldonanto: Ludwig Pickel, Nürnberg
P&k. Nürnberg 819 56-851

Grava alvoko

Societo por "Esperanto-Centro D-ro Zamenhof" fondita

Hamburg (pp) Ankoraŭ dum la preparlaboroj por la 59-a Universala Kongreso de Esperanto en Hamburgo kelkaj Hamburgaj esperantistoj diskutis la ekgermantan ideon, fondi societon

"Esperanto-Centro Dr. Zamenhof

Domo por internaciaj renkontiĝoj".

Jam la 19-an de decembro 1974 kunvenis la sinjorinoj: Hella Lanka, Friedel Kogel-Tischler, Elisabeth Bormann kaj la sinjoroj: D-ro Werner Bormann, D-ro Rüdiger Sachs, Hans Schütt, Heinrich Wielgus, kaj fondis, laŭ la germanaj leĝoj, la societon.

La germana nomo estas: "Esperanto-Centro Dr. Zamenhof, Haus für internationale Begegnungen e.V."

La celo de la societo estas: Aĉeti en la Federacia Respubliko Germanio taŭgan domon kaj poste administri ĝin, analoge al la franca Gresillon.

En la domo okazu du- aŭ trisemajnaj kursoj por komencantoj kaj progresintoj, stud- kaj edukrondoj por kursgvidantoj kaj funkciuloj, internaciaj feriaj renkontiĝoj kun klerigaj kaj distraj programoj. La domo fariĝu la centro de la Esperanto-movado en Germanio kun ampleksa biblioteko.

Intertempe la koncerna ŝtata instanco akceptis la societan statuton kaj enregistris la societon kiel juran personon. Ĝi do laŭ leĝo estas agpova organizaĵo.

La societo ofertas:

Fariĝu membro de la societo! Subtenu la unikan kaj nekompareblan entreprenon en la esperantista sfero. Vi povas membriĝi, pagante al la societo 1.000 GM. Por aĉeti taŭgan domon, estas necesaj 200 membroj aŭ kelkaj pli. Laŭ la statuto unu persono rajtas posedi nur dek partojn po 1.000 GM.

Laŭ tiu posedo la membro ankaŭ havas respektivajn voĉojn en la decidaj kunvenoj: unu, du aŭ dek voĉojn. Membriĝi rajtas naturaj kaj juraj personoj, do ankaŭ societoj. Post la enpago de la mono ĉiu membro ricevos la statuton kaj po sumo de 1.000 GM unu posedanto-dokumenton. Ĝi tiu dokumento rajtigas al la voĉdonado. Ĝi estas vendebla kaj la voĉdonrajto delegebla. La societo restos memstara kaj absolute sendependa de iu ajn Esperanto-organizaĵo.

Seriozaj interesitoj petu prospekton kaj statuton de la prezidanto de la societo: Heinrich Wielgus, D-2000 Hamburg 26, Elise-Averdieck-Str. 34/I.

Günther Jacob 75-jara

Nürnberg (pp) Günther Jacob, Nürnberg, festas sian 75an naskiĝtagon la 29an de majo 1975. Li esperantistiĝis 1920 en Trebnitz, Silezio, partoprenis la 11an Germanan Esperanto-Kongreson en Breslau, gvidis multajn Esperantokursojn en Trebnitz kaj Oppeln, fondis en 1923 "Polican Esperantogrupon", estis sekretario de "SILEO" de ĉ. 1929 ĝis 1933, delegito de UEA en Oppeln de 1924-1933. Post la dua mondmilito li revigligis la Esperantomovadon en Ansbach, gvidis kursojn kadre de la popola altlernejo 1946-50 kaj aranĝis publikajn propagand-vesperojn. Pilo-Press kore gratulas al la jubileulo, kiu ankaŭ hodiaŭ partoprenas en la Esperanto-vivo!

Internacia Esperanto-konferenco en Saarbrücken

Saarbrücken (pp) Sarlanda Esperanto-Ligo okazigos internacian konferencon de la 10 - 17 aŭgusto 1975 en la Filozofia Fakultato de la Universitato de Sarlando kun la temo "La lingva problemo en la nuntempa mondo kaj la aktualaj taskoj de la neŭtrala Esperanto-movado". Prelegos: prof. d-ro Ivo Lapenna, André Bourdeaux, Heinz Dieter Maas, Günther Becker, d-ro Mario Dazzini, prof. d-ro Max Mangold, Jean Thierry, Reinhard Hauptenthal, Helmut Sonnabend kaj Marianne Vermaas.

Informojn donas: Sarlanda Esperanto-Ligo, Franz-Schubert-Str. 26, D-6602 Dudweiler.

Esperanto en radio

Letero de leganto favore al Esperanto en "Vatikana Radio"

La aprila bulteno de la Vatikana Radio publikigis leteron de esperantisto proponante radiajn elsendojn en la internacia lingvo. La traduko de la letero tekstas jene:

"Se oni konsideras, ke milionoj da esperantistoj el malsimilaj kredoj, aŭ eĉ ateistoj, volonte aŭskultus Vatikanan Radion, se ĝi uzus Esperanton, kial oni povas ne uzi tiun rimedon, kiu povus fariĝi ilo de konvertado kaj savo por multaj? Per tiu lingvo oni disvastigas la penson de Maŭ, de anarkistoj, de spiritistoj, de ateistoj, de komunismo; kial ne uzi ĝin por la Evangelio?"

Antaŭjuĝoj ne valoras. Kuru sampaŝe kun la tempo. Ni jam havas la Sanktan Meson en Esperanto. Pastro Giacinto Jacobitti, kiu loĝas apud Santa Maria Maggiore, redaktas la meslibron en Esperanto, ni ankaŭ havas la Biblion en Esperanto ktp. Do, decidiĝu, okaze de la Sankta Jaro."

La leteron skribis Ippolito Pellis, I-34170 Gorizia. Tiun aperigon oni konsideras signifoplena ĉar verŝajne per ĝi la Vatikana Radio volas sondi la terenon por ekscii ĉu estas konsilinde aldoni Esperanton al la longa listo de la ĝis nun uzataj lingvoj.

Do, se - kiel oni fidas - sufiĉe multaj esperantistoj tra la mondo reeĝos je tiu letero, subtenante la en ĝi faritan proponon, la dezirata ebleco povos konkretiĝi.

Se vi volas kunhelpi tiucele, skribu nacilingve al

RadioVaticana, Città del Vaticano.

Radio Roma nun elsendas sur jenaj ondoj: 30,90 m (9710 khc), 41,24 m (7275 khc), 25,42 m (11800 khc), dimanĉe je la 21a horo ĝis la 21a horo kaj 20 minutoj.

El la semajna komentario de d-ro Alfred Macher

Radio Vieno 24/25 majo 1975

"Gromyko kaj Kissinger ripete laŭdis la aŭstrian politikon. Kissinger deklaris, ke ĉiam interesas lin la opinio de Bruno Kreisky pri mond-politikaj demandoj. Laŭdis la aŭstrian politikon ankaŭ la bulgaroj kaj poloj okaze de la aktualaj vizitoj al iliaj landoj de kanceliero Kreisky, respektive prezidento Kirchschräger. Nur la Jugoslavoj malsamopinias. Post plurmonata silento la beograda registraro denove atakas Aŭstrion preskaŭ ĉiun tagon, asertante, ke Aŭstrio neniel plenumas la ŝtatkontrakton koncerne sian slovenan minoritaton. Du jugoslavaj gazetoj eĉ demandis, ĉu Aŭstrio havas ekzistrajton."